

Kubo defendos sian suverenecon fronte al la agresoj



Havano, dec 1 (RHK) La ĝenerala direktoro por Usono de la ministerio de eksteraj rilatoj de Kubo, Carlos Fernández de Cossío, asertis ĝe la nacia televido, ke Kubo defendos sian suverenecon fronte al la kreskanta agresemo usona.

Kubo ne toleros enmiksiĝon en siaj internaj aferoj kaj defendos ĝiam sian rajton je memdetermino, asertis la diplomato dum televida elsendo por denunci la partoprenon de la ambasado de tiu norda potenco en malstabiligaj agoj en Havano.

Fernández de Cossío ampleksigis informojn pri la rekta enmiksigo de la negocataĵo de Usono en Havano, Timothy Zúñiga-Brown, subtene al la ĝefroluloj de supozata malsat-striko en urba kvartalo.

Per tiu ago ampleksigita tra la sociaj retejoj, la membroj de la nomata Movado San Isidro klopodis perforte liberigi homon punigitan pro malrespekto al la aŭtoritatoj.

Fernández de Cossío detaligis kiel la usona diplomato estis vokita pasintsabate al la ministerio de eksteraj rilatoj por memori al li la konduk-regulojn starigitajn de la Konvencio de Vieno, kaj certigi al li ke Kubo ne toleros enmiksiĝojn en siaj internaj aferoj.

La ĝoficiala komunikado, la kuba ministerio petis al la usona diplomato transdoni tiun sciigon al la usona ĝtata departemento.

La kuba funkciulo klarigis, ke Kubo ne akceptas tian konduton kaj ne toleros ke li nek lia ambasado agu malrespekte al la leĝoj kaj normoj perfortante siajn devojn kiel diplomato.

Ankaŭ klarigis ke la kuba registaro “plene konas la enmiksiĝon de Usono en la financado, gvido kaj instigo al grupo kaj individuoj por defii la registaran aŭtoritaton de la insulo jen pace jen perforte”.

Li denunciis la konstantan klopodon involvi en siaj celoj la plej reprezentajn sektorojn de arto, kulturo kaj intelektularo kaj uzi la sociajn retejojn por distrumpeti falsajn informojn, instigi malamon kaj voki al kontraŭleĝa agado.

Fonto: PL

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/241202-kubo-defendos-sian-suverenecon-fronte-al-la-agresoj>



Radio Habana Cuba